




## La ŝtonoj de Cattolica

Rüdiger SACHS

Antaŭ la hotelo “Diamante“, Via Bologna 3, 47033 Cattolica/Italio staras “skulptaĵo“ el sabloŝtono (Bildo 1). Ĝin ŝtele forporti en pantolona poŝo aŭ mansako estas neebila entrepreno, ĉar ĝi pezas ĉ. 120 kg. Similaj ŝtonskulptaĵoj, tamen malpli grandaj, troviĝas laŭdire en Kolonjo/Germanio, kie la fama ĵurnalisto kaj aŭtoro *Günter Wallraff* pli grandigis sian domicilon per vitra alkonstruaĵo kiel lumoplenan muzeon por adekvata ekspoziciado de la ŝtonaj artaĵoj al la publiko.




**Bildo 1:**  
Ŝtona ornamajo  
ĉe la hotela enirejo

Kiu estas la artisto? Kiu tiom artiste skulptis kaj engravis la malmolan materialon per tiaj sulkoj kaj dikaĵoj? Kiu smirgis kaj tiom fajne glatigis la krudan ŝtonsurfacojn? Ne, ĉe tiuj ĉi ŝtonskulptaĵoj ne temas pri produktaĵoj de homo: la artisto, kiu kreis ilin, estas – la naturo.



**Bildo 2:** Ŝajnas, ke ili vere “elkreskas“

Laŭlonge de la marbordo (proksime de Cattolica) ili troviĝas en ŝtona dezerto, 20 km for de la Esperanto-Kasteleto en Tavoleto. La Tavoletanoj diras, ke tie “elkreskas ŝtonskulptaĵoj el la marbordaj rokaĵoj“. Ĉu vere? Ĉu vere divers-konsistaj ŝtonmaterialoj ene de la rokaĵo kapablas ŝlifprodukti tiajn skulptaĵojn? Ĉu ne pli verŝajne la mara akvo forlavos malpli firmajn tavolojn kun sekva artaĵa formiĝo – kvazaŭ farita per artistaj homaj manoj (Bildo 5)?



Mi tendencas al la dua tezo, konsiderante la fortajn tajdajn mar-moviĝojn kaj la fortegon de la daŭra ondofrapado, kiu muelas, disfrotas kaj fine pulvorigas la ŝtonan materialon kun diversa formado dum tiu dispeca proceso.

(Bildojn 1, 3 kaj 5 faris s-ino Helga Pisters)

**Bildo 3:** “Skulptaĵo“ fingroforma

